

EKO 2023

**Pensu globe
Agu loke
Por la landa,
Fakaj kaj
Regiona
Laboro**

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komuniko



**Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,
Komercestoj, Blinduloj, Kolektantoj**

EKO 2023 / 29. Majo 20, 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

Provlegantoj: Rob Moerbeek (NL), Gbeglo Koff (TG), Eida Doerfler (IT).

Pezo: Baza teksto: 255 KB. Alkroĉaĵoj: Martinus (759KB - sveltigita).

Orienta Timoro – ĉu nova landa sekcio?

Nia Esperanto-Klubo en Timor-Leste 'La Tri Lagoj' estas malgranda, sed ĝi komencas montri iom da kresko kaj pluraj membroj estas tre aktivaj. Estas ĉiam pli da entuziasmoj kiuj volas lerni. En la sociaj amaskomunikiloj kiel *Facebook* kaj *WhatsApp* ni rekomendas la uzon de Duolingo kiel rimedon por pliprofundigi la scion de Esperanto. La celoj de la klubo estas antaŭenigi la uzon de la lingvo Esperanto en Orienta Timoro, lerni kaj praktiki Esperanton, kaj informi pri Esperanto kaj la nacia timora lingvo (Tetuna).

Dum la Zamenhofa festo, ni sukcesis kunveni en la parko sur la strando kaj ni diskutis niajn agadplanojn por 2023. Ni planas pligrandigi nian radio-programon. Lídia organizos programon kiu estos pli-malpli kiel konversacio, aŭ neformala renkontiĝo inter esperantistoj. Ni jam interparolis kun indoneziaj esperantistoj kiuj pretas partopreni nian elsendon. Ni volas prilabori la lecionojn kiujn ni uzis dum la instruado ĉe la radio, por fari libreton kaj vortareton, por gvidi la komencantojn kaj faciligi ilian lernadon. Fakte antaŭe, Teofilo kaj Heidi jam kunlaboris por havi tetunan version de la gramatika parto de la ŝlosilo, kiun Heidi jam uzis dum siaj lecionoj en Dilio. La vortara parto ankoraŭ bezonas provlegadon.

Ni ŝatus fondi pliajn klubojn, kaj tiel povi fondi nacian asocion. Ne malpli ol sep el niaj membroj planas iri al la UK kaj IJK en Italio. Se ni sukcesos, ni ĝojos povi montri niajn kantadon kaj kulturajn dancojn de nia lando, vestitaj per tradiciaj vestaĵoj. Ni ankaŭ povas prezenti ion pri nia Eo-movado kaj pri la turismaj lokoj de nia lando. Tio certe kuraĝigos nin lerni pli. Kontakti nin se vi volas helpi, ĉar la vojaĝkostoj estas tro altaj por ni. Financa helpo bonvenas kaj eblas pere de la konto 'timoro' ĉe UEA. Se vi volas scii pli pri nia movado, vi povas spekti la prelegon kiun Cornelio kaj Mateus faris dum la Aŭstralia kaj Nov-Zelanda virtuala kongreso kaj Somerkursaro de Esperanto en januaro 2021 (https://mallonge.net/OT_EO1).

Eblas aŭskulti kaj eĉ vidi la radio-programon vive ĉe Facebook ('Radio Liberdade Dili - FM 95.8 Mhz') kaj rete ĉe <https://onlineradiobox.com/tl/liberdade/>. Se vi volas partopreni ene de la Zoom-sesio, petu la ligilon de ni. Vi povas kontakti nin pere de la teofilosemariadejesus@gmail.com kaj mateus.93desena@gmail.com.

La informo venis pere de la azia komisiono de UEA.

Kosmos alirebla de Martinus

Jen nova numero de Eo-Kosmos n-ro 1, 2023 en pdf-formatoj.

La aktuala nova numero temas pri la terglobo kiel viva estulo kaj pri militoj kaj krizoj sur la tero laŭ kosma vidpunkto. Ni dufoje jare sendas la revuon al vi, kaj nun estas en du diversaj formatoj: PDF kaj ePub. Se vi ne ricevas la revuon en ePub-formato, bonvolu kontroli vian "Spam-dosieron", ne estas danĝera dokumento aŭ mesaĝo. Vi povas peti senpagan abonon de eo-Kosmos, revuo de Martinus-Instituto. Uzu la retejon por aliri la PDF aŭ malaboni la revuon. ĉe esperanto@martinus.dk

Ole Therkelsen

SMG: Martinus: Jen neligita faka asocio kiu aktivas.

Brazila kolekto

Kiel baza regulo de **Brazila Kolekto** oni publikigas en la retejo originalajn komponaĵojn de brazilanoj, ĉieajn kantojn tradukitajn de brazilanoj, kaj brazilajn kantojn tradukitajn de ĉieaj esperantistoj. Alivorte, ĉion kio kunigas Esperanton, Muzikon kaj Brazilon. Vi trovos en la retejo kelkajn eksterlandaĵojn, se ili estas esperantigitaj de brazilaj samideanoj. Kaj du el tiaj kantoj aperis ĉi-semajne: la fama bolero *Sabor a mí*, de la meksika komponisto Alvaro Carrillo, kiun **Vitor Mendes** esperantigis. Plie, trovu la konatan muzikaĵon de la usonano Ben E. King, originale *Stand by me*, laŭ traduko de **Markone Froes**. Krome, spektu videon de la bela kaj emocianta komponaĵo *Enquanto eu cantar*, verkita de Alexandre Santos kaj tradukita de **Flávio Fonseca**. Aliru la kolekton per: brazilakolekte.com

Altkvalita lingvoplanado

Temas pri mia nova libro "语言规划讲义"(yuyanguihua jiangyi, kurso de lingvoplanado), kion ĵus aperigis unu el la plej bonaj eldonejoj en Ĉinio. La dosiero enhavas la bibliografian informon, antaŭparolon kaj enhavtabelon. En la libro estas almenaŭ 80 paĝoj pri Esperanto kaj interlingvistiko...

Haitao Liu @ <http://person.zju.edu.cn/lht>

https://www.researchgate.net/profile/Haitao_Liu17

ILEI en Ganao

Mi kiel Landa Reprezentanto sukcese parolis kun jenaj esperantistoj kiujn mi konas en Ganao, por ke ni kunlaboru kaj oficiale starigu teamon de Instruantoj en Ganao. ILEI Ganao jam estis registrita de mi kaj s-ro Mensah. Mi jam havis diskuton kun direktorino pri edukado en la regiono Korle Klottey, kie oni bonvenigas instruadon de Esperanto en mezlernejoj kiel Klubo unuafoje kaj preskaŭ unu horo semajne. Mi ĝis nun ne akiras oficialan aprobon, sed mi sekvos la diskuton ĝis la finfina aprobo.

Alfred Kobina ARTHUR, Ganao

Abunda kunveno en Bunda

Estas nur 13 km for de la nacia parko Serengeti al la urbo Bunda, Tie ni renkontiĝas kaj lernas Esperanton!. La 1-an de majo 2023 ni okazigis Esperanto-kurson! Tio temis pri ekzercado de Esperanto kaj lernado kaj uzi komputilon kiel ilon por faciligi interkomunikadon. Temoj el la kurso:



1. Lernado por uzado de la komputiloj kun programoj konvenaj por Esperanto. La programo estis sub gvido de s-ro Dismas Robert Kusaya
2. Kiel uzi afiksojn en Esperanto-parolado: gvidanto estis S-ro Mulele Mbassa Makaranga

En la kurso partoprenis naŭ personoj kiuj estas dividita en du horoj por ĉiu temo! . S-ro Dismas Robert Kusaya gvidis la kurson instruante al la lernantoj kompreni startigi la komputilon, koni la programojn instalitajn en la komputilo kaj scii kiel uzi ĝin por aliri la retojn. La kurso estis ege interesa kaj altiris la intereson de la lernantoj. En la dua kurso-sesio, s-ro Mulele Mbassa Makaranga instruis al la instruantoj koni la afiksojn. Poste komenciĝis paroliga leciono pri uzo de la afiksoj en lingva parolo! La leciono finiĝis je la 11:30 nokte! Ĉiu estis kontenta kaj ĝuis la Esperantan etoson. Ni esperantistoj en Bunda deziras al ĉuj bonan kunlaboron por la Esperanta agado en la tuta mondo!

Bosnio-Hercegovino havas aktivulon

Dum la lastaj kvar jaroj ni presis plurajn plurlingvajn eldonaĵojn (unu el la lingvoj estas Esperanto). Ni nun preparas presitan eldonaĵon pri nia urbo - Banja Luka (ni jam presis la mapon de Banja Luka). Tiuj ĉi agadoj subtenas la proponon de koleginino Aurora Bute..

Ljubiša Preradovic

PARDONO, AMO KAJ PACO

Ne estas paco sen justeco,
Ĉar ne estas paco sen travidebleco,
Travidebleco kaj justeco kreas pacon,
Sed, ili ne estas la solaj.
Ne estas paco en korupto,
Ĉar ne estas paco en fraŭdo.
Korupto kaj fraŭdo mortigas la pacon,
Sed, ili ne estas la solaj.

Ne estas paco en milito,
Ĉar ne estas paco en mizero.
Mizero kaj milito mortigas pacon,
Sed, ili ne estas la solaj.

Ne estas paco en milito,
Ĉar ne estas paco en mizero.
Mizero kaj milito mortigas pacon,
Sed, ili ne estas la solaj.

Ne estas paco sen demokratio,
Ĉar ne estas paco en la diktaturo;
Ili neniam vivis kune,
Ili ne povas produkti pacon;
Ne estas paco sen amo,
Ĉar ne ekzistas paco sen pardono.

Amo kaj pardono protektas pacon

Honore Sebuhero <honsebn@gmail.com>:
Rutshuru/Norda Kivuo, Kongo DR

Studsemajno en Nederlando kun kurso

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Studosemajnfino en Nederlando

Gvidantonomo: Arjen-Sjoerd de Vries

Tipo: Nova movada kurso

Lolo: Bornerbroek, Nederlando.

Aldoninto: ineke

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27533>

Pli da tradukoj bezonataj por la Esperanto-Tago!

lingvistoj kutime parolas pri 7 000 lingvoj en la mondo. eble ili iom troigas, sed tamen la ĉi-jara afiŝo por la Esperanto-tago estis tradukita ĝis nun nur en 12 lingvoj. estas ankoraŭ amaso de laboro por fari, karaj komitatanoj, se vi ne partoprenas ĉi iun laboron, kiu devas partopreni ĝin? Bonvolu rigardi la tradukojn ĉi tie

<https://drive.google.com/drive/folders/1j2YPOICyxZlc7L6umprFgX1ol4oUers>

kaj sendi novajn tradukojn al mi (RC) aŭ al Rafael Lima, unesperante@gmail.com.

Hispana muziko en Esperanto kaj la hispana

Netuŝita kverko – Inocencia Montes – Ana Manero – Miguel Fernández

<https://youtu.be/cV3oF2qP7oM>

La hispana originalo “Quercus intacto”, ankaŭ per la voĉo de Ana Manero,

spekteblas ĉe: <https://youtu.be/WPaixzt95VM>

Mga

Rusaj esperantistoj kunvenas

En majo 2023 en Timirjazevo apud la urbo Tomsk (Rusio) 10 tomskaj esperantistoj komencis festadi la 44-an naskiĝtagon de Tomska Esperanto-Klubo (TEK).

Kvar tomskaj esperantistoj esprimis siajn dezirojn partopreni la 32-an Konferencon de Rusia Esperantista Unio (REU), kiu okazos enkadre de Rusiaj Esperanto-Tagoj en aŭgusto 2023 ĉeeste aŭ virtuale (en la interreto). Estas planataj aliaj programeroj por la festado en la 19-a de majo. La klubo fondiĝis en majo 1979.

Vladimir MININ

===== vortoj: 1380 =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/> ĉe:

<https://www.ilei.info/agado/EKO.php> por 2023 (ĝis 20.).

ALDONU VIN: Skribu al stefan.macgill@gmail.com. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolisto. Iris al konytolo majo 16 GK korektolis majo 17.